

- **loke**
Raporto de NOREK, kiu okazis ĉi-jare en Enumclaw, Vaŝingtonio
- **anoncoj**
Forpaso; Revo de infanoj; Korespondpetoj; Skribu al Avo Frosto
- **vojaĝe tra Usono**
Fiŝo-jubilo
- **instruado**
La eterna progresanto
- **facila teksto**
Mia granda aventuro per *Pasporta Servo*
- **vojaĝe tra la mondo**
Mia malkovro de Japanujo (*unua parto*)
- **anoncoj**
ESF celas plifortigi la usonan movadon
- **enigmoj**
Promenado kun hundo
- **senintenca esperantaĵo?**
“murdo”



NOREK-anoj kunvenas je alteco de 6600 futoj (2012 metroj) en la parko *Mount Rainier* en Vaŝingtonio. Vidu la artikolon. (*Supra foto danke al Less KERR.*)

Okazis NOREK notinda

Raportas Arlyn KERR, <arlyn@morsekob.org>

ENUMCLAW, VAŜINGTONIO — Fine de Septembro okazis NOREK, La Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco. Partoprenis ĉi-jare dudek unu personoj: kvin el Kanado, la aliaj el Usono. Kelkaj venis de malproksimaj lokoj, ekzemple David de Marilando kaj Orlando de Kalifornio.

Dum la interkona vespero ni ludis kelkajn ludojn, inkluzive de *Dixit*, ni aŭdis novajn originalajn poemojn, kaj ni kudris kudrilujojn ornamitajn per verdaj steloj. La ĉefa evento estis ekskurso al apuda nacia parko *Mount Rainier*, kie ni piedmarŝis kaj piknikis inter ŝtelemaj garoloj.

Sabaton vespere kaj dimanĉon matene, kelkaj partoprenantoj paroladis pri la kongresa temo *daŭrigebla energio por ĉiuj*, kaj kelkaj pri diversaj temoj: Armenujo, la historio de la simbolo @, kaj kiel krei artikolojn por Vikipedio en Esperanto. Kelkaj faris sian unuan geokaŝan ekskurson. Ni eĉ iomete provis la ĉinan arton Tajĝiĉuano! Pliaj fotoj [<http://picasaweb.google.com/morsekob>

/NOREK2012] troviĝas rete.

Venontjare NOREK okazos en (aŭ proksime al) Viktorio, Brita Kolumbio.



Partoprenanto Ellen EDDY el Vaŝingtonio trovas trezoron en geokaŝludo [<http://goo.gl/rl04h>].

anoncoj

Forpasoj

- Membro **Frank CARTER** en Nov-Hampŝiro forpasis la 2-an de Junio.
- S-ino **Mary NAPOLITANO** forpasis la 27-an de Julio. Ŝi estis membro dum multaj jaroj.
- Honora membro **Harry HARRISON** forpasis la 15-an de Aŭgusto. Aperis nekrologo en *New York Times* [<http://goo.gl/5PtMG>] kiu menciis lian fortan subtenon de Esperanto. Li famiĝis pro siaj sciencfikciaj romanoj, interalie tiuj de la serio *Stainless Steel Rat*. Haveblas rete unu el tiuj en Esperanto, la romano *Naskiĝo de la rustimuna ŝtalarato* [<http://ttt.esperanto.org/Ondo/Rato01.htm>].

Korespondi deziras

- Mi estas 54-jaraĝa viro, profesia fotografisto en Tanzanio. Mi interesiĝas pri elektroniko, fotografio, libroj, komputado, edukado por infanoj kaj komunuma evoluo. Mi deziras korespondi pri diversaj temoj.
Sylvester N. NYINYIMBE, P.O. Box 147, Bunda - Tanzania
<sylvesternyinyimbe@yahoo.com>
- Mi estas 40-jaraĝa edzo en Melburno, Aŭstralio, kiu serĉas amikon por regule korespondi kun mi. Mi estas relativa komencanto, do ne gravas al mi, kiom kompetenta estas la korespondanto.
Duncan McDONALD
<duncanmcdonald@optusnet.com.au>

Revo de infanoj

Mi konatiĝis kun François HOUNSOUNOU antaŭ ok jaroj dum TEJO-seminario en Francujo. Li estis ege entuziasma pro sia unua eŭropa vojaĝo

kaj li regalis nin per afrikaj bongustaĵoj. François estas daŭre entuziasma kaj aktiva esperantisto, kaj li ĵus pasigis ekzamenon por fariĝi lernejestro.

Jam ekde kelkaj jaroj François aktivas kadre de neregistara Esperanta organizo Afrika Centro Mondcivitana (ACM) [<http://www.bit.ly/revedenfants>] kaj organizas internacian kampanjon *Revo de infanoj* por kolekti materialojn por lernejoj – ĉefe por helpi al orfoj, stratinfanoj kaj handikapuloj. Mi donacas al la kampanjo ĉiujare, kaj ŝatus peti ankaŭ vin sendi al ACM diversajn lernejajn necesajojn: kajerojn, kraĵojn, skribilojn, librojn, revuojn (aŭ en Esperanto aŭ la franca) ktp. Mondonacoj per UEA ankaŭ eblas (konto *hufs-j*). Via nomo, kompreneble, aperos en la listo de donacintoj, kaj la infanoj en Benino estos ege dankemaj pro via donaco! Kontaktu s-ron Hounsounou per <esperantoawc_benino@yahoo.fr> aŭ poŝte:

*Afrika Centro Mondcivitana/ACM
BP 226 Lokossa-Mono
Rép. du Benin*

— *Ĵenja AMIS*

Skribu al Avo Frosto!

Ĉu vi scias, ke Avo Frosto nun loĝas en Kanado? Li parolas multajn lingvojn, inkluzive de Esperanto. Infanoj povas sendi al li leterojn – pere de la Kanada Poŝtosistemo kaj la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) – kaj ricevi respondon en Esperanto.



Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn. Ne forgesu klare skribi viajn nomon kaj adreson, kaj indiku la vorton “Esperanto” por certigi respondon en la ĝusta lingvo. Lia adreso estas:

**AVO FROSTO
NORDA POLUSO
KANADO - CANADA
HOH OHO**

Fiŝo-jubilo

Aventuroj de Mobile-a bestkuracisto

Johano BENTLEY

La urbo Mobile, en Alabamo, estas iom stranga. Ĝi ne estas granda, sed ene ĝi havas multon. Ĉi tie ni havas vastan ŝipkonstruejon kie oni fabrikas super-sekretajn ŝipegojn por la mararmeo. Ni havas la firmaon *Aerobus*, kie oni fabrikas grandegajn aviadilojn. Ni havas tri el la plej bonaj universitatoj en la mondo. Kaj ni eksportas preskaŭ du elcentojn de la fiŝoj kaj marfruktoj, kiujn la mondo konsumas.



Loko de la urbo Mobile en Alabamo, Usono

Nur kvar aŭ kvin kilometrojn ekster la urbo estas sovaĝejo kie homoj ne estas bonvenaj – krom kiel tagmanĝo, eble. Misteraj marĉoj kaj musk-drapiritaj kverkoj kaj cedroj tentas onin eniri por ekskursoj al vidindaĵoj kiel la hantita insulo, kie fantomoj de mortintaj indianoj laŭdire atendas nesingardulojn. Eble oni volus fiŝkapti, aŭ ĉasi aligatorojn aŭ aprojn. Multaj kuraĝaj homoj eniras tiun sovaĝan landon ĉiujare, serĉante aventuron... sed ne ĉiuj eliras.

Se la sovaĝejo ne sufiĉas, oni povas veturi nur tridek minutojn for por ĝui kelkajn el la plej belaj plaĝoj en la tuta mondo. Sukerblanka sablo, smeralda akvo travidebla kiel vitro, kaj malabunde vestitaj homoj atendas turistojn.

Unu el la plej nekutimaj aferoj en Mobile estas, ke ĉiujare fiŝoj saltas el la maro sur la plaĝon.

Vere! Oni povas promeni laŭ la golfbordo kaj simple preni fiŝojn de sur la sablo, aŭ el la tre malprofunda akvo. Laŭ mia scio, Mobile estas la sola loko kie tia fenomeno okazas regule, ĉiujare. Dum multaj jaroj la afero restis granda mistero. Tamen finfine sciencistoj opinias, ke ili komprenas ĝin. Jen kelkaj indikaĵoj; ĉu vi povas solvi la enigmon?

1. La fenomeno okazas nur dum Julio, Aŭgusto, kaj Septembro.
2. Aŭgusto estas la plej varma kaj seka monato en Mobile.
3. Gasoj ne bone solviĝas en varmaj likvaĵoj.
4. La Golfo de Mobile estas tre larĝa, sed ankaŭ tre malprofunda. La meznombra profundo estas nur dek tri futoj (kvar metroj).
5. Multe da riveroj fluas en la Golfon de Mobile, do ĝia fundo konsistas el miksaĵo de sablo kaj koto: perfekta medio por algoj kaj planktono.
6. La specoj de marbestoj trovitaj sur la sablo estas tiuj, kiuj kutime loĝas ĉe la fundo de la golfo. Ekzemple: flesoj, kraboj, katfiŝoj, salikoketoj, ktp.

Kiel tiuj faktoj povas ŝanĝi racian fiŝon al memmortiga fiŝo? Ĉu vi rezignas pri la solvo? Jen ĝi:

Somere, la temperaturo ĉe la surfaco de la golfo povas atingi pli ol 90°F (33°C). Pro la malprofundo de la akvo, la diferenco inter surfaco kaj fundo estas nur kelkaj gradoj. Je tiaj temperaturoj, oksigeno ne facile solviĝas en akvo. Samtempe estas malpli da pluvo dum tiu sezono por miksi la akvon. Finfine, pro la temperaturo, algoj kaj planktono bone kreskas ĉe la fundo de la

golfo. La rezulto estas manko de oksigeno, kaj la fiŝoj komencas droni! Do ili naĝas kaj rampas al la bordo, kie oksigeno sufiĉas por vivi. Mirinde, ĉu ne?

Kutime la “jubiloj” okazas frumatene, antaŭ tagiĝo, kaj oni ekscias pri ili nur kiam mevoj freneziĝas ekstere. Estas danĝere paŝi sur la plaĝo en la mallumo, ĉar kelkaj specoj de fiŝoj povus vundi la piedojn. Katfiŝoj kaj skorpfiŝoj havas venenajn dornojn, kaj iliaj pikoj ege dolorigas. Estas nepre porti lampon kaj ŝuojn!

La plej danĝera fiŝo estas rajo. Ankaŭ ĝi havas venenan dornon sur la vosto, per kiu ĝi povas vipi la maleolojn de tro proksima preterpasanto. La dorno firme fiksiĝas en la haŭto de la trafito, kaj foje por forpreni ĝin oni bezonas operacion. Se tio ne estas sufiĉe terura, la rajoj estas ofte nevideblaj, ĉar ili kaŝas sin sub la sablo. Flesoj ankaŭ sin kaŝas tiel, kaj oni kaptas ilin per eta harpuno. Kiel distingi inter la du specoj, antaŭ ol ĵeti harpunon? Ne eblas! Kaj tio memorigas min...

Pasintjare la fiŝo-jubiloj okazis kvinfoje ĉe mia domo apud la Mobile-golfo. Fine de la kvara fojo, mia fridujo estis plenŝtopita de flesoj, kraboj, kaj salikoketoj. Do kiam mi vekigis denove, aŭdante la bruegon de mevoj ĵus antaŭ tagiĝo, mi ne povis sukcese entuziasmigi mian edzinon aŭ miajn infanojn pri la jubilo. Tamen, ĉiufoje mi estas entuziasma pri ĝi, ĉar la okazo estas tiom mirinda.

“Vekiĝu!” mi kriis. “Okazas jubilo denove! Vekiĝu!”

“Lasu min dormi!”, plendis mia edzino, dormeme. “Ni ne bezonas pli da fiŝoj.”

“Lasu nin dormi”, plendis miaj infanoj. “Ni ĉeestis jam kvarfoje.”

“Aĉaj familianoj!” mi grumblis. “Miraklo okazas ĉe nia sojlo, kaj vi volas nur dormi. Nu, mi iru sole kaj vidu, kion Panjo Naturo liveras.”

Mi surmetis ŝuojn kaj pantalonojn, prenis mian harpuneton el ŝirmejo, kaj iris eksteren al la plaĝo. Mi bone konstatis, ke ni ne bezonas pli da fiŝoj – efektive, mi eĉ ne povus enŝovi pli da fiŝoj en la fridujon. Tamen ĝuste antaŭ mi, mi vidis grandegan silueton sub la sablo, kaj mi ne povis rezisti. Mi ĵetis kaj trafis!



Marbestoj serĉas oksigenon en la Golfo de Mobile.

Subite la sablo kaj akvo erupciis, kaj mi sentis fortan, brulantan baton sur mia femuro. Mi havis nur momenton en tiu matena krepusko por ekvidi la plej grandan rajon, kiun mi iam vidis en la golfo de Mobile. Ĝi saltis el la akvo kun mia ridinde eta harpuno en la rando de unu el siaj naĝiloj kaj plaŭdis ree en la akvon. Gapante, mi falis sur mian pugon en la suro-profundan akvon dum la elstaranta tenilo de mia harpuno ŝajne naĝis rapide for de mia vidpovo.

Mi restariĝis kaj lamis al la ĝeto, kie mi inspektis mian femuron per la lamplumo, por certigi, ke la dorno ne ĉeestis. Longan, ruĝan strion mi trovis, sed nenian truon. Ĉu la dorno simple maltrafis min, aŭ ĉu ĝi jam restis en alia viktimo de tiu monstro, mi ne sciis. Tamen, mi ja sciis, ke mi kaptis sufiĉe da fiŝoj por tiu tago!

La venontan tagon mi trovis mian harpunon sur la plaĝo, forlasitan tie kiel defion, kun la pinto kurbigita al orto.



Johano BENTLEY

Johano estas dufoja veterano de NASK. Kiel profesia bestkuracisto en Mobile, Alabama, li vivas sur la limo inter sovaĝejo kaj civilizacio, inter bestoj kaj ties posedantoj – kiuj foje estas pli sovaĝaj (aparte kiam mono postuliĝas).

<classicalswordsman@comcast.net>

La eterna progresanto

D. Gary GRADY

Years ago, Father Guido Sarducci (a fictional character played by comedian Don Novello) said he wanted to start a “Five Minute University.” It would be based on the idea that everything the average college graduate remembers five years after graduation can be learned in about five minutes (allowing 20 seconds for spring break).

“You know, like, in college, you have to take a foreign language. Well, at the Five-Minute University, you can have your choice: any language you want, you can take it. Say if you want to take Spanish, what I teach you is ‘¿Como está usted?’ — that means ‘How are you?’ — and the answer is ‘Muy bien’ — means ‘Very well.’ And believe me, if you took two years of college Spanish, five years after you out of school, ‘¿Como está usted?’ and ‘Muy bien’ is ‘bout all you gonna remember.”

(You can see the entire bit on YouTube [<http://youtu.be/kO8x8eoU3L4>].)

Of course, Father Guido was exaggerating a bit, but what he said is basically true: people *do* tend to lose their ability to communicate in a language they don’t use actively, even if that language is one they grew up speaking. Those still studying a language can also hit a roadblock. I don’t know what percentage of foreign language students never get beyond the beginning level, but for native speakers of English the figure is surely quite large.

What distinguishes an *eterna komencanto* in Esperanto is a sustained interest in the language despite knowing only the basics. Interestingly, it’s rare to hear the term used as an insult. That’s partly because tolerance is central to the *Interna Ideo*, and partly because we need all the friends we can get. In fact, quite a few *eternaj*

komencantoj have contributed a good deal to promoting Esperanto. And a fair number have eventually — perhaps after a change in circumstances made more free time available — gone on to become very fluent speakers.

Incidentally, the terms *komencanto* and *progresinto* are interesting for their grammatical difference. The former implies that one is still beginning; the latter that one has progressed past that stage. Presumably we’d all want to be *eternaj progresantoj* as well as *progresintoj*, always learning and improving, but we all eventually (often more than once) reach a point where our progress slows to a stop, or near to it. This a problem only if it occurs too soon, before we’ve reached our desired level of fluency.

How do you help your students break past that point, or move beyond it yourself?

First, making progress requires a commitment of time and work — less with Esperanto than with other languages, but still a fair amount of it. Ideally we should devote a few hours every day, but rarely is that practical for more than a few weeks at a time, in the context of an intensive course like NASK. The alternative is to spend some time on Esperanto every day, or at least several days a week, preferably in a variety of ways.

For many of us, reading is the easiest way to learn since we can do it at our own pace. As I’ve mentioned before, I’ve found it helpful to mark unfamiliar words and then go back and look them up in a batch, writing down the words and their English equivalents — either in a notebook, a text file on a computer, a smart phone, or the like. The act of simply writing something down tends to make it easier to remember, and the resulting self-made dictionary gives you a simple way to review. It doesn’t much matter what you read as long as it’s in good Esperanto and it’s something you find interesting.

Second, even for Esperanto speakers well past the beginner stage, it can help to work our way through a textbook from time to time to refresh our knowledge of the grammar. One good choice is Montagu C. Butler's *Step by Step in Esperanto*, available for \$13 (less if you're a member) from the Esperanto-USA libroservo [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. The lessons are very brief, often taking only a minute or two to read. *Step by Step* also works well as a grammar reference.

For something more like a conventional textbook, Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-lando* (\$30.60) is probably the most widely used advanced textbook today. Another good text is William Auld's classic *Paŝoj al Plena Posedo*. David K. Jordan's *Being Colloquial in Esperanto* (\$15 in print, or free online [<http://weber.ucsd.edu/~dkjordan/eo/colloq/colloq.html>]) is organized like a reference book but can also be read cover to cover, and as a bonus it's highly entertaining. Both *Step by Step* and *Being Colloquial* are in English, so they're good choices for people who have reached the *progresinto* level but still aren't completely comfortable reading Esperanto.

To get practice writing as well as reading, join a mailing list or other on-line discussion forum, such as those at Lernu [<http://lernu.net>]. Invite people to point out your mistakes — and take it cheerfully when they do!

Besides reading, you'll probably want to do some listening, and today the Internet makes available everything from podcasts, songs, and YouTube videos to traditional radio programs something like those on NPR or the BBC, but in Esperanto. A good starting place is the online 24-hour Esperanto radio station Muzaiiko

[<http://muzaiiko.info>]. For many more choices, simply search for "Esperanto radio."

To work on your pronunciation, consider getting a digital voice recorder (which you can find many places, including drugstores), or a voice recorder application on a smart phone.

For practicing live conversation there's always your local group as well as regional, national, and international meetings, but today we also have Skype, Google+ hangouts, and the like to let you talk with Esperanto-speaking friends and acquaintances in the U.S. and elsewhere. Another option to consider is Livemocha [<http://livemocha.com>], an online community where people help each other learn languages, including Esperanto. I haven't tried it myself, but I've heard some positive reports.

If possible, also devote some time to serious, intensive study by immersion at a *kongreso* or even better the North American Summer *Kursaro* [<http://esperanto.org/nask>] in the U.S. (specifically in Raleigh in 2013) or at one of the similar courses offered in Europe. It's remarkable how fast one can progress in such an environment.

In any case, the key to moving from *progresinto* to *progresanto* is simply investing the effort and finding out what works for us as individuals.



D. Gary GRADY

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto. He lives in Durham, NC.

<dgarygrady@frontier.com>

facila teksto

Mia granda aventuro per *Pasporta Servo*

Karolina BRANDON

Ĉu vi scias, ke vi povas gastigi ĉe aliaj esperantistoj en ĉiu parto de la mondo? Jes! Vi povas.

En la jaro 2010, mi kaj miaj amikinoj decidis vojaĝi al la regiono Toskanio (itale, *Toscana*) en okcidenta Italujo.

Unue, mi aĉetis la libron *Pasporta Servo*.

Ni elektis la gastigantojn Rena kaj Lucio BARASHI, kiuj loĝas en la urbo Terno.

Ni alvenis al la stacidomo de Terno en Aprilo. Kia **surprizo** renkonti Renan, kiu estis bela kaj juna! Ŝi veturigis nin hejmen en sia aŭto.

Alia surprizo estis ŝia **ĉarma**, bele malnova domo. Ĝi troviĝas en kamparo kun multaj arboj.

Rena prezentis al ni sian edzon, Lucio, kaj la familian hundon, Blanche. (Blanche ne parolas Esperanton. Ŝi komprenas nur la italan lingvon.)

Rena estas ege lerta kuiristino. Mi manĝis kaj trinkis bone.

La duan tagon, Lucio gvidis longan **ekskurson** en la regiono por ni.

La sekvan tagon, Rena veturigis nin al vin-farejo. Ĝi estis tre interesa, sed oni ne donis al ni **specimenojn**. Domaĝe.

La lastan nokton okazis granda festo kun la Esperanto-grupo de Rena. Ni kantis, ni ridis, kaj ni manĝis.

Kia aventuro! Ni deziras fari alian. Aĉetu la libron *Pasporta Servo* kaj ĝuu vian propran aventuron!

Klarigoj

aventur/o

danĝera aŭ plezura (neatendita) vico da okazaĵoj

ĉarm/a

plaĉa, bela

ekskurs/o


longa plezura aŭ esplora promenado aŭ vojaĝo

specimen/o

iomete da iu produkto, por konigi ĝin al eblaj aĉetontoj

surpriz/i

mirigi pri io neatendita; ~o: neatendita novaĵo



Lernu pli pri la Pasporta Servo ĉe ĝia retejo [<http://pasportaservo.org>]. Vi povas aĉeti la libron ĉe la retbutiko de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].



Karolina BRANDON

Karolina loĝas en Garlando, Teksaso, kie ŝi ludas pianon kaj estas oratoro. En 2012 ŝi estris la Distran Vesperon ĉe la Landa Kongreso de Esperanto-USA.

Mia malkovro de Japanujo (*unua parto*)

Ĵenja AMIS

“Mia nomo estas Ĵenja kaj mi naskiĝis en Kioto”, mi diras en sinprezento al japanaj esperantistoj.

Ili rigardas min kun malkredo.

“En Kioto-*strato* – en Kievo, Ukrainio.”

Jes, tio klarigas: oni ridetas. Kievo kaj Kioto estas ĝemelaj urboj, kaj kvin minutojn for de mia naskiĝ-loko eĉ troviĝas japana parko kun torijo, pagodo, eta “Fuĵi-san” kaj aleo de sakuroj, la plej longa en Eŭropo. Eble danke al tiu hazardo mi ĉiam revis viziti Japanujon. Ĉi-jare mia revo realiĝis!

Verdire, la anonco pri la IJK-2012 en Japanujo estis simple preteksto por viziti la landon. Pro tio, eĉ malgraŭ la nuligo de IJK, ni ĉiukaze decidis viziti. Iom egoisme, sed por ni tio estis eĉ pli bone, ĉar oni havis tempon gastigi kaj ĉiĉeroni nin! Tra la tuta vojaĝo kaj nun, reveninte, mi devas miri pri kiom malofte ni havis okazon vere sperti Japanujon – ne nur supraĵe, kiel kutimaj turistoj, sed loĝante en domoj de japanoj, kune manĝante, promenante kaj babilante.

Kutima por vojaĝemaj esperantistoj, la pasport-serva vojaĝmaniero estas tute nekomprenebla por multaj, kaj mi ofte devas klarigi al amikoj kaj kunlaborantoj, kiel ĝi funkcias. Ili simple ne povas imagi, ke, eĉ ne estante riĉa, oni povas vojaĝi al tiom malproksima kaj multekosta lando kiel Japanujo kaj sperti la landon tiel, kiel oni ne povas sperti ĝin eĉ estante la plej riĉa homo en la mondo! Iam en buso en Kioto okazis amuza miskompreno: aŭskultante nin interparoli en nekonata lingvo, unu virino demandis al nia gastigantino, la bonkora sinjorino Tahira, ĉu ŝi hazarde ne estas profesia ĉiĉerono. Ŝi diris ke ne, kaj provis klarigi, kiel ni konas unu la alian, kaj ke ni gastas en ŝia domo kiel esperantistoj. La demandinto do tuj pensis, ke ŝi havas gastodomon kaj profesie gastigas eksterlandanojn!

Dum preskaŭ tri semajnoj ni vizitis dek-kvinon

da urboj kaj urbetoj sur du insuloj: Honŝu kaj Ŝikoku, kaj renkontiĝis kun pluraj esperantistoj kaj E-grupoj. Ni spertis la trankvilon kaj serenecon de la japana kamparo kaj la frenezan ritmon de Tokio. Ni “malkovris” multajn aferojn, manĝaĵojn kaj homojn. Mi plenigis tutan kajeron per vojaĝnotoj, kaj ni alportis hejmen du mil fotojn. Ni spertis la aŭtentikan japanan gastamon, la ekstreman malavarecon kaj mirigan zorgemon de ĉiuj niaj gastigantoj kaj ĉiĉeronoj. Ĉiu persono, kiun ni renkontis, restos por ĉiam en niaj koroj!

Hiroŝimo: 67 jarojn poste

Post 15-hora flugo el Montrealo, finfine, nia aviadilo surteriĝas en Hiroŝimo, la komenco de nia vojaĝo. Sekvas 15-minuta veturo de la centra stacidomo, kie s-ro Oŝioka renkontas nin, tra zigzagaj montecaj vojoj, kaj jen ni alvenas al la hiroŝima Esperanto-domo, kie loĝas la famaj esperantistoj Moritaka kaj Taeko OŜIOKA (antaŭ kelkaj jaroj ili estis premiitaj pro sia internacia agado per Esperanto).

Gesinjoroj Oŝioka ĵus revenis de la UK en Vjetnamujo, kaj en la lasta mesaĝo, kiun ni ricevis antaŭ la foriro, ili skribis: “Ni jam revenis el Vjetnamujo kaj mi jam komencas kuiri.” Ni pensis, ke certe estas iu miskompreno: ne temas pri kuirado *por ni*: ni ja alvenas nur post unu tago! Sed, vidinte la vespermanĝon, mi komprenas, ke tio ne estis miskompreno: nin atendas vera festeno konsistanta el almenaŭ deko da pladoj, interalie, tempuro (japanaj fritajoj), floroj de *okura* (estas nur unu semajno en la jaro, kiam oni povas manĝi ilin – kaj, bonŝance, ni trafis tiun semajnon) kaj malvarmaj nudeloj – *somen* – kun akvomelono. Plej malfacile estas manĝi la nudelojn per bastonetoj, kaj mi ekbedaŭras, ke mi ne ekzercis min pri manĝado per bastonetoj pli bone antaŭ la vojaĝo.

Lacegaj post preskaŭ du tagoj sen dormo, ni iras al nia bela japanstila tatama ĉambro. En modernaj japanaj domoj ofte estas japanstila ĉambro, tre

utila por gastoj: en ĝi tute ne estas mebloj aŭ lito, kio permesas gastigi multajn personojn samtempe. La planko estas kovrita per tatamoj – tapiŝoj el plektita riz-pajlo – kaj en la angulo, bela kaligrafiaĵo kun vazo – *tokonoma*, la plej honora parto de la ĉambro. Malsimile al eŭropanoj aŭ usonanoj, kiuj kutimas havi apartajn dormoĉambrojn, la ĉambroj en tradiciaj japanaj domoj ofte estas multifunkciaj: ĉiuvespere oni metas matracon kun litotukaĵoj, kaj ĉiumatene oni forigas ĝin – jen bona utiligo de malgranda spaco.



La kupoldomo *Genbaku* en Hiroŝimo, super kiu eksplodis atombombo. Ĝi nun estas pacmuzeo.

Kiam la tempo haltis...

Hiroŝimo situas en tre bela loko – en la montaro apud la Interna Maro. Bedaŭrinde, la urbo estas fama ne pro siaj belaj pejzaĝoj, sed pro la teruraĵoj de atombombado. Laŭ s-ro Oŝioka, ofte vizitantaj esperantistoj imagas Hiroŝimon daŭre kuŝantan en ruinoj, kio tute ne veras. La urbo renaskiĝis: ĝi estas moderna urbo kun granda aŭtoindustrio, sed la pac-muzeo, pluraj monumentoj kaj la konservita bombita kupoldomo, 600 m super kiu eksplodis la bombo, estas porĉiamaj atestoj pri tio, kio okazis tie antaŭ 67 jaroj. Provizitaj de mapoj kaj gvidlibroj (du el kiuj estas eldonitaj de gesinjoroj Oŝioka), ni iras promeni en la urbo. Pacmuzeo estas nia unua celo.

La 6-an de aŭgusto 1945, je la 8:15 matene, la tempo haltis en Hiroŝimo. 140 mil personoj perdis la vivon. Iuj tute elvaporigis, eĉ sen lasi la ostojn – ja temperaturo en la epicentro atingis kelkajn

milojn da gradoj. Iuj suferis longajn horojn, tagojn, monatojn poste. Inter ili multaj infanoj, kiuj devige laboris konstruante ŝirmejojn. Oni povas vidi fandiĝintan sablon kaj tute detruitajn etajn uniformojn de lernejoj. Oni vidas bildojn de infanoj, kiuj desegnis spertitajn teruraĵojn: jen la aro de kadavroj kuŝantaj laŭlonge de la rivero – por identigo. Jen la homoj kun vizaĝoj ŝveliĝintaj pro radiado kaj starantaj haroj plenaj de radioaktiva polvo...

La muzeo ĉi-jare prezentis ankaŭ kolekton de dokumentoj el Usono, kiuj estis ĵus malsekretigitaj. Ili plie montras la hipokritecon de la decido senaverte bombi Hiroŝimon kaj Nagasaki – supozeble por fini la pacifikan militon, sed en la realo, por testi atombombon en la realaj cirkonstancoj (pro tio oni eĉ malpermesis “kutiman” bombadon de kelkaj “kandidat-urboj”, por vidi la plenan efikon), kaj por “montri la muskolojn” al Sovetunio kaj eviti ties influon, ĉar Japanujo jam fakte komencis pac-negocojn kun ĝi. Estas eĉ letero de usonaj sciencistoj, kiuj provas konvinki la usonan registaron pri la danĝero de tia senaverta atako... Mi rememoras, ke kelkajn tagojn antaŭ nia vojaĝo mi aŭskultis intervjuon de unu el la usonanoj, kiujn oni ordonis faligi la bombon, kaj kiu daŭre tre sincere kredis, ke tio estis necesa por fini la militon...

Sed, feliĉe, Hiroŝimo renaskiĝis – oni komencis purigi la urbon tuj post la atako, kaj en kelkaj partoj de Hiroŝimo, tramoj funkciis jam kelkajn semajnojn post la atako. La urbo fariĝis vivanta rememorigo pri danĝeroj de nukleaj armiloj. En la muzeo tutan muron kovras protest-leteroj, adresitaj al mondaj potenculoj, prezidantoj kaj ĉefministroj, de la sinsekvo de hiroŝimaj urbestroj kontraŭ uzado kaj testado de nukleaj armiloj. Hiroŝimo fakte komencis la tutan movadon de “Urbestroj de Paco”: movado de nun ĉ. pli ol kvinmil urboj (reprezentantaj ĉ. miliardon da personoj), kiuj kampanjas por forigo de nukleaj armiloj. La loĝantoj de Hiroŝimo deziras, ke tiu ĉi teruriga sperto tamen helpas konstrui mondon sen nukleaj armiloj. Ni esperu, ke oni aŭskultos...

Milo da pac-gruoj

Apud la muzeo estas diversaj monumentoj: jen

al mortintaj instruistoj kaj infanoj, jen al miloj da mortintaj koreoj, loĝintaj en Hiroŝimo por devigaj laboroj. Tre kortuŝa estas la monumento al knabineto SASAKI Sadako, kiu reprezentas ĉiujn senkulpajn viktimojn de militoj. Ŝi havis du jarojn kiam la bombo falis. Forblovita el fenestro pro la eksplodo, ŝi tamen supervivis la atakon kaj kreskis tute sana. Tamen en 1955 ŝi estis diagnozita je leŭkemio, kaj kuracistoj prognozis al ŝi nur unu jaron por vivi. Ŝi famiĝis pro la mil pacgrupoj, kiujn ŝi faris, malgraŭ teruraj doloroj, kredante, ke se oni faras mil paperajn grupojn, la dioj realigos la deziron. Ŝia deziro estis simple vivi... ĉar tiutempe en Japanujo mankis papero, ŝi uzis kiun ajn paperon, kiun ŝi trovis, inkluzive volvaĵon de medikamentoj. Post la morto de Sadako, ŝiaj amikoj kampanjis por kolekti monon por ŝia monumento, kiu estis inaŭgurita en 1958. Ĝi diras “Estas nia krio. Estas nia preĝo. Paco en la mondo.” En tiama Sovetunio, kie mi naskiĝis, oni tre bone konas ŝian rakonton kaj eĉ havas kelkajn kantojn pri ŝi. Eble pro tiu ĉi malgaja rakonto, oni vidas pacgrupojn ĉie en Hiroŝimo – ofte ili estas plektitaj kune kaj foje oni faras tutajn bildojn el la aro da plektitaj grupoj.

“Kiu estas la ĉefministro?”

Promenante en la parko, ni renkontas grupon da japanaj junuloj, kiuj volas babili kun ni en la angla. Ili demandas min, ĉu mi scias, kiu estas la nuna japana ĉefministro? Mi hontas, ke mi tute ne memoras – ja ili ŝajne ŝanĝiĝas ĉiujare, kaj ĉiam, kiam mi lernas, jam estas nova ĉefministro! Junuloj ridas, ĉar tio fakte estis ilia sekva demando: “Kial do japanaj ĉefministroj tiom ofte ŝanĝiĝas?” Poste ili montras bildojn de ĉiuj lastatempaj ĉefministroj kaj demandas, se mi devus enamiĝi al unu el ili, kiu li estus? Mi elektas Koizumi, kaj ili estas kontentaj: “Jes, li estas la plej bona.”

Tiu ĉi babilado, fakte, ne estas simpla scivolemo – estas ilia somera tasko: deviga ekzerciĝo pri la angla kun eksterlandanoj. Lernado de la angla estas tre malfacila por japanoj, kaj ili investas multe da tempo kaj mono por lerni ĝin. Kaj pro tio, ke oni ĉefe lernas nur la skriban anglan, parolado kun multaj eksterlandanoj apud la Pac-muzeo estas bona okazo iomete ekzerciĝi pri

la parola parto. Post kelkaj minutoj nin invitas babili alia infano – 7-8-jara knabineto kun sia panjo. Ŝi demandas pri japanaj manĝaĵoj kaj ĉu ni gustumis diversajn specialaĵojn de Hiroŝimo. Kiel donacon por la tempo paroli kun ŝi ni ricevas... nu kompreneble, pacgrupojn!

La flosanta sanktejo

Nia sekva celo en la hiroŝima regiono estas la insulo Mijaĵima. Por atingi ĝin oni devas trajni ĉirkaŭ horon, kaj tiam preni pramsipon. La insulo estas majesta: kovrita de verdaj montoj kaj ĉirkaŭita de blua akvo, sur kiu kvazaŭ flosas la ruĝa sanktejo Icukuŝima – ĝi aspektas kiel io tute surreala.



La grandega torijo ĉe la ruĝa sanktejo de Icikuŝima

La insulo estas plej konata pro tiu ĉi sanktejo kun la grandega torijo (*O-Torii*): pordego en akvo – unu el la plej konataj vidindaĵoj en Japanujo kaj parto de la Monda Heredaĵo de UNESKO. Torijoj markas la enirejon al ŝinto-sanktejo: ili estas jen lignaj (plej ofte farbitaj ruĝe), jen ŝtonaj, jen eĉ betonaj. Tiu ĉi torijo estas tre speciala, ĝuste pro tio, ke ĝi staras en akvo. La sanktejo staras sur platformo en akvo kaj ŝajnas, ke ĝi vere flosas sur akvo. Kvankam la torijo en akvo sur tiu ĉi loko staras ekde la 12-a jarcento, la nuna torijo datiĝas de la jaro 1875. 16 metrojn alta, ĝi estas farita el putroimuna kamforarbo.

Icukuŝima-sanktejo ne estas la sola vidindaĵo sur la insulo: ĝi havas tutan aron da aliaj vidindaĵoj, ŝinto-sanktejoj kaj budhismaj temploj, kiuj tute harmonie kunvivas. Foje ŝinto-sanktejo estas eĉ integra parto de pli granda budhista

komplekso. Por ni, okcidentanoj, tiu ĉi paca kunvivado estas aparte interesa, ĉar, akceptinte kristanisman, la praaj religioj estis tute forgesitaj kaj eĉ diaboligitaj (ekzemple, en la ukraina lingvo la vorto “pagana” en la nuna lingvaĵo signifas “malbona”).

La insulo estas sufiĉe granda kaj eĉ havas kelkajn urbetojn. Iuj lokanoj estas posedantoj de multenombraj restoracioj kaj vendejoj. Sed, krom lokanoj, Mijaĵima havas aliajn nekutimajn loĝantojn: cervojn! Malsame ol la plejparto de aliaj cervoj, japanaj cervoj (*ŝika*) ne perdas makulojn je maturiĝo. Tiuj ĉarmaj bestoj loĝas sur la insulo jam de jarcentoj kaj tute ne timas homojn aŭ aŭtojn. Sed atenton! Kiom ajn ĉarmaj estas la cervoj, ili transformiĝas en monstrojn kiam ili flaras ion ajn manĝeblan. (Ĵurnaloj kaj eĉ paperaj ventumiloj apartenas al “manĝebla” kategorio!) La cervoj persekutos vin, ĝis kiam vi donos la manĝaĵojn al ili! Fakte, malgraŭ oficiala malpermeso manĝigi cervojn, homoj ofte faras tion, kaj la bestoj iamaniere sukcesas trovi paperojn kaj kun plezuro manĝas ilin – eĉ malgraŭ tio, ke la insulo mem estas ekstreme pura.



Unu el la ĉarme voremaj cervoj de Mijaĵima

Ĉeburaŝka. *Kaŭai!* (“Ĉarme!”)

Revenante hejmen, en memoraĵ-vendejo mi rimarkas ion tute strangan: Ĉeburaŝka! Ĉeburaŝka estas ĉarma rolulo de rusa infanrakonto kiu havas grandegajn orelojn. Mi tute ne povas imagi, ke ekster la ruslingva mondo iu konus tiun beston! Tamen en Japanujo oni ne nur konas lin, oni eĉ vendas memoraĵojn kun Ĉeburaŝka, kiu tenas en la manoj la faman japanan kuketon (*manĝu*) kun skribaĵo “Hiroŝima” sur ĝi!

Kompreneble, mi ne povis rezisti aĉeti tian perfektan ekzemplon de interkultura kunfandiĝo! Kiel evidentiĝis, Ĉeburaŝka tre popularas en Japanujo kaj eĉ havas plurajn filmojn. Mi poste demandis al unu esperantistino, kial la besto tiom populariĝis? La respondo estis: “Ĉar li estas tiom ĉarma!” Etaj (sed ne nur etaj) japaninoj adoras ĉion ĉarman (“*kaŭai!*”), kaj ofte havas iun ĉarman monstreton alkroĉitan al sia mansako (mi devas konfesi, ke ankaŭ mi alkroĉis Ĉeburaŝka-n al mia mansako). La ĉarmaj monstroj videblas ĉie: sur reklamoj, afiŝoj, ŝildoj kaj eĉ sur alvokoj donaci sangon!



Pro tio, ke en Japanujo ĉio plej bone vendiĝas per ĉarmaj monstroj, ĉu eble ankaŭ ni adoptu iun ĉarman beston, kiel Ĉeburaŝka-n? Anstataŭ *manĝu*-kukon ni surmetu verdan stelon kaj donu al ĝi la nomon “Esperaŝka”, ekzemple, kaj tiel certigu la finan venkon en Japanujo.

[*Sekvos la dua parto venontnumere. – Red.*]



Jenja AMIS

Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

<evgeniya.amis@gmail.com>

ESF celas plifortigi la usonan movadon

Jenja AMIS

Ĉu vi sciis, ke pli ol **16 mil personoj en Usono** lernas Esperanton danke al Lernu [http://lernu.net]?

Kun preskaŭ 130 mil registritaj uzantoj ĉie en la mondo kaj kelkaj milionoj da paĝvizitoj ĉiumonate, Lernu estas la plej granda Esperanto-retejo kaj Esperanto-komunumo en la mondo. Dekomence, la paĝaron financas la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF), inter multaj aliaj projektoj grandaj kaj malgrandaj.

La laboron de ESF ebligas la donacado de esperantistoj.

Ne nur Lernu, sed ankaŭ Edukado.net (retaj rimedoj por instruistoj de Esperanto), *Pasporto al la Tuta Mondo* (rektmetoda video-kurso), *Springboard2Languages* (eduka eksperimento en britaj bazlernejoj), kaj kompreneble *NASK*, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ricevis financan subtenon de ESF – kaj tiuj estas nur kelkaj ekzemploj el la eduka kampo.

ESF uzas siajn rimedojn por konkretaj projektoj kiuj antaŭenigas Esperanton, edukadon kaj interlingvan justecon. La fondaĵon gvidas estraro de konataj usonaj kaj kanadaj esperantistoj.

Vi povas ekscii pli pri la agado de ESF vizitante ĝian retejon [http://esperantic.org]. Tie vi ankaŭ trovos manierojn donaci al la fondaĵo, kiu donas impostkvitancon al ĉiuj usonaj donacantoj. Eblas donaci unufoje, ekzemple per PayPal aŭ via UEA-konto, aŭ enskribiĝi por ĉiumonata donacado.

Per kreskigo de la kapitalo de ESF, vi plifortigos la Esperanto-movadon en Usono! Ĉar ESF

laboras por la longdaŭra evoluo de la movado, indas pripensi ankaŭ la eblecon testamenti al ĝi.

ESF bezonas vian subtenon. *Ni elkore dankas ĉiujn niajn donacantojn kaj petas konsideri fari donacon al ESF ĉi-jare!* Skribu al ni ĉe <admin@esperantic.org> kial vi donacas al ESF!

Adreso por ĉekoj: ESF, Cop Ste Catherine, CP 60502, Montreal QC, H1V 3T8 (Canada) | UEA-konto *esfo-p*

Ĉi-jare mi festas mian 25-jariĝon en Esperantujo. Dum lastaj jaroj en ĉiuj renkontiĝoj, kiujn mi partoprenis, mi sukcesis konatiĝi kun diversaĝaj bonaj parolantoj, kiuj tiam partoprenis sian unuan kongreson post kiam ili lernis Esperanton per Lernu [http://lernu.net]. Ĉiam mi admiras ilian bonegan prononcadon kaj grandan vortrezoron. Bona ekzemplo estas la filmo de Rowland GOODBODY en la filmejo de Edukado [http://goo.gl/A1vtM].



Synnöve
MYNTTINEN,
Finnlando

Lernu kaj Edukado.net [http://edukado.net] estas nuntempaj metodoj instrui Esperanton por milionoj da homoj ĉie en la mondo samtempe efike kaj altkvalite laŭ ĉies personaj kapabloj. Esperantujo ne havas ekonomiajn rimedojn por kio ajn. Tial ni devas uzi la monon por plej fruktodonaj metodoj plivastigi la lernadon de la lingvo kaj plialtigi la lingvonivelon de homoj, kiuj jam iam lernis ĝin. Tial mi de tempo al tempo donacas monon al ESF, kiu, laŭ mia kompreno, ĝis nun sukcesis subteni multajn valorajn aferojn en nia Esperanto-komunumo en scienca kaj praktika nivelo.

enigmoj

Promenado kun hundo

Ĉi-numere Vilĉjo HARRIS prezentas al ni alian enigmon el la libro *Gimnastiko por Cerbo de TACUMI Hirosi*, havebla ĉe la libroservo. **Bonvolu ne sendi vian solvon al la redakcio!**

Homo, kiu havas hundon, loĝas for de fervoja stacio je distanco de 2 km.

Iun tagon li ekpromenas al la stacio en rapido de 4 km/h. Samtempe, la hundo ekkuras al la stacio en rapido de 20 km/h.

Ĝus post kiam la hundo atingas la stacion, ĝi revenas same rapide al sia mastro marŝanta. Tuj kiam ĝi renkontas sian mastron ĝi denove kuras al la stacio. Ĝi ripetas la kuradon tien kaj reen ĝis la mastro finfine atingas la stacion.

Kiom estas la tuta distanco, tra kiu la hundo kuras?



La solvo aperos en n-ro 2012:6.

senintenca esperantaĵo?

“murdo”



Murdo, Suda Dakoto. Ĉu vere estus saĝe halti tie?
(Dankon al fotisto Christopher ZERVIC.)

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

*Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA*

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.